n-ro 96

oktobro 2008

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Kotizoj, kontoj kaj perantoj

La ĝenerala kunveno decidis pri nova kotizsistemo: jara membrokotizo nun estas 10 eŭroj (por UEA-landokategorio A) aŭ 5 eŭroj (por UEA-landokategorio B). Dumviva kotizo kostas 20-oblon de la jara kotizo. Ricevantoj de la papera versio de La Merkato trovas sian kotiz-staton sur la adresetikedo; aliaj povas kontroli ĝin en la reta adresaro. Eventuale ili petu sian pasvorton je ikef(a)telenet.be.

Pro la malofta uzo kaj la relative altaj kostoj, la IKEF-poŝtĉekkonto estis fermita. Se pago ne eblas per UEA, FEL, Moneybookers aŭ kontanta mono, la privata konto de la kasisto povas esti uzata.

Post la kongreso venis demando pri la IKEF-perantoj. Pluraj el ili maljuniĝas kaj deziras liberiĝi de tiu tasko. Aliflanke, nun ekzistas multe pli rapidaj komunikiloj kaj pagiloj ol antaŭe. Pro tio perantoj eble malpli necesas. Temo diskutota dum la venontjara ĝenerala kunveno. (rr)

## Enhavo

Kongresaj raportoj . . . . . . . . . . 3
Membraro . . . . . . . . . . 5
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . 7
Sukcesa IKEF-Ĉinio 2008 en Xiamen . . . . . . . . . . 8



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.
**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** ekde 2008 estas 10 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 5 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj') (aŭ egalvaloro en konverteblaj valutoj). Kotizo estas por la kalendara jaro. Membro kiu aliĝas dum la jaro pagu proporcie pli ĝis la fino de la posta jaro. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- www.moneybookers.com (konto=retadreso de kasisto)
- per banko: petu kontoinformon de la kasisto

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉ*inio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

**IKEF-kunvenoj dum la Roterdama Universala Kongreso**

Ĝenerala Kunveno je dimanĉo 20 julio 2008

Ĉeestis 21 personoj, inter ili 14 membroj. La raporto pri la jaro 2007 estis aprobita kaj la eksiĝintaj estraranoj Kurz kaj Wang estis reelektitaj por periodo de 2 jaroj.

Grava ero de la kunveno estis la refiksado de la membrokotizoj pro la ŝanĝiganta aktiveco de IKEF. Post diskutado la jara membrokotizo ekde 2008 estis fiksita je 10 eŭroj (por UEA-landokategorio A) aŭ je 5 eŭroj (por UEA-landokategorio B). Dumviva kotizo kostas 20-oblon de la jara kotizo.

La tagordero pri la nova membroadministrado, enkondukita dum 2007 sed ĝis nun nur de parto de la membraro efektive uzita, komence provokis malmultajn komentojn. Ŝajne unu parto de la membraro tute ne konas ĝin, dum alia parto estas kontenta pri ĝi. Nur iom post iom venis la realaj rimarkoj. Kelkaj (maljunaj) membroj opiniis ke ĝi estas tro komplika. Aliaj membroj konfesis ke ili ne mem registris sin, sed transdonis la taskon al alia, pli kompetenta persono. Vera diskuto pri la realaj mankoj kaj bezonoj ne ekestis. Restas kelkaj detaloj plibonigendaj (ekz. lingvaj eraroj) kaj estu pli da eblecoj por la ĝenerala mastrumado. Membroj sciigu la spertitajn problemojn al la respondulo, d-ro Hornecker.

Lasta ero estis la estonto de IKEF, kiu ja daŭre funkcias kun nekompleta estraro. Estis lanĉitaj kelkaj proponoj rilate al terminologia laboro kaj tradukado, sed mankas gvidaj personoj por tiaj projektoj. Tamen, la ĉeestantaj membroj unuanime decidis, malgraŭ la malgranda aktiveco, daŭrigi la asocion.

En 2009 la UK okazos en Pollando, en 2010 en Kubo. Verŝajne la kasisto ne partoprenos tiujn kongresojn. La estraro jam sufiĉe frue ekpreparu la tieajn kunvenojn.

Vizito al la havena ĉefoficejo je jaŭdo 24 julio

Grupo de 25 personoj metroe veturis al la oficejo de la haveno de Rotterdam (www.portofrotterdam.com). Ili estis akceptitaj en salono kun bela vido sur la grandega havena areo. Poste ili aŭskultis (kaj precipe vidis) ampleksan prezentadon de s-ro Luyckx, kiu brile montris la gravecon de Rotterdam, la plej granda haveno de la regiono kaj unu el la plej gravaj havenoj de la mondo.



**Afrika Mondo pri Komerca Esperanta Fako (AMKE)**

Alvenis ĉe IKEF la sekvanta peto de "AMKE", reprezentata de AGBENOU Kodjovi Francis (retadreso: agbenouko2(a)gmail.com kaj agbenouko2(a)yahoo.fr, tel. 00229- 93-85-34-83)

*Kreiĝis AMKE por promocii esperantan komercon kaj komercon per esperanto kaj por allogi multojn akcepti pli oficiale Esperanton por reciproka negoco. AMKE ŝatus neŭtrale agadi laŭ la idealismo de Zamenhof kaj rilatigi homojn al homoj per varma inda amikeco sen diskriminacio. AMKE devas laŭleĝe agadi komunprofite por helpi eksterlandajn komercistojn favore komerci en Afriko, helpi trovi klientojn kaj oferti senpagan gastigadon. AMKE helpos promocie komerci afrikaĵojn eksterlande.*

*AMKE ŝatus plenrajte labori kiel ido de IKEF en Afriko kaj devas respekti la statutan planon de IKEF. AMKE petas la studadon de tiu propono por havigi al AMKE la rajton pri plena kunlaboro. AMKE ŝatus partopreni al la komunaj aranĝoj de IKEF por prezenti la vivon de komerco en Afriko.*

**Ĉu asocio bezonas membrojn?**

Kiom da membroj regule pagas sian kotizon? Kiom da novaj membroj ni registris? Kiamaniere ni akiru novajn membrojn? Ĉu tiaj demandoj gravas? Kompreneble, baza membraro gravas por havi stabilan, funkciantan asocion, sed eble nuntempe estas aliaj prioritatoj.

Pro la interreto, asocioj nun havas konkurencon de aliaj komunumoj, ekzemple *Facebook* kaj *Second World*. Tial asocioj ekpensu komerce kaj konsideru siajn eble estontajn membrojn samtempe kiel akciulojn kaj klientojn. Ĉu la ofertitaj servoj gravas por ili? Ĉu la kvalito estas bonega? Se jes, eble iuj uzos ĝin kaj eĉ se ili ne membriĝas, tio povas por la asocio esti pli profitdona ol enkasigo de membrokotizo.

Kio reale gravas ne estas la membrokvanto, sed la nombro da personoj/kontaktoj/amikoj kiujn la asocio (1) atingas, (2) influas, kaj, ideale, (3) kunlaborigas en sia reto.

*(Resumo de artikolo de Tom Reiser, asocia spertulo ĉe medicinaj asocioj, en revuo "Headquarters", aprilo 2008)*

**Novaj adresoj**

78. Walter van den KIEBOOM, Wapenplein 17 - 8, 8400 Oostende, Belgio

372. Xiao Fujun, Xilou-328 Shi, 1 Duan-3 Hao, Renmin-Zhonglu, Chengdu, Sichuan, 610015, Ĉinio, rete grupoyema(a)hotmail.com. Lasttempe mi fondas novan kompanion, kiu nomiĝas "Grupoyema". Ĝia celo estas uzi Esperanton por internaciaj komercaj aferoj. Mi ofte vizitas Eŭropon.

**Nova dumviva membro**

295. Alfred Kobina Arthur, Ganao

**Novaj membroj**

378. Eran VODEVOZ, tel. +972-54-4647910, rete evodevoz(a)yahoo.com, Israelo

379. Peter EBENAU, 1e Atjehstr. 158-1, NL-1094 KW AMSTERDAM, Nederlando,tel. +31-20-6946073, fakso +31-20-4651843, rete info(a)attentive.nl, www.attentive.nl

380. Fabrício VALLE, HIGS 704 - Bloco B - Casa 22, 70274-040 Braziljo, Brazilo, tel. (61) 9819-0951, rete corretor(a)fabriciovalle.com.br, www.fabriciovalle.com.br, instruisto pri filozofio, makleristo je nemoveblaĵoj

381. John Huang, B3M 4T2 Halifax, Nova Scotia, Kanado, tel. 19024882588, fakso 19024823388, rete info(a)sinoatlantic.com, www.sinoatlantic.com; manaĝero

**Forpaso**

En la revuo Esperanto de julio 2008 estos anoncita la morto de Ilija Andreev el Bulgario. Li estis 79jara, IKEF-membro 152 aliĝinta en 1992.




**Internaciaj kongresoj**

La Unuiĝo de Internaciaj Asocioj en Belgio (www.uia.be) regule enketas pri internaciaj kongresoj. La rezultoj de la lasta enketo kaj ĝia analizo (ekz. la ĉefaj kongreslandoj kaj -urboj) legeblas i.a. je www.icca.com kaj www.hqmagazine.eu.

**IFEF 2009 en Trieste**

La 61a kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) okazos je 23-29 majo 2009 en Trieste, Italio. Informoj je www.esperanto.it/trieste/.




**Jarkolekto de TAKE 2008**

En septembro aperis la nova jarkolekto de TAKE, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

La ĉefa artikolo estas de Jan Werner kaj temas pri transmisio de sono tra planko kaj tekto. Aliaj artikoloj estas pri ventolado (Fabien van Mook), defluiloj (Pierre Grollemund), pneŭmataj konstruktoj (Bronislav Ĉupin), ŝtalkonstruado (Remy Boucher) kaj la preparoj al la Ŝanhaja Mondfoiro (Shen Chengru).

La kolekto estas ligita al membreco de TAKE; jara kotizo estas 6 eŭroj. La eldonoj 2005, 2006 kaj 2007 de la Jarkolekto ankoraŭ estas haveblaj. Skribu al take.esp8(a)free.fr por ricevi pagdetalojn.

**www.ikef.org denove alireblas**

Dum la jarŝanĝo 2007-2008 evidentiĝis ke la adreso www.ikef.org (registrita en Ĉinio) ofte estis neatingebla. Nun IKEF transprenis tiun adreson. Eblas denove legi la IKEF-retpaĝojn tra ĝi kaj krome tra la adresoj www.ikef.net, www.ikef.info kaj http://users.telenet.be/ikef/.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Sen lando

Aleks, retadreso abaudry(a)hotmail.com, serĉas laboron por la venonta jaro. Li estas ekonomia inĝeniero, kaj laboris dum kvar jaroj en agrokultura ekonomio, kiel asistanto de esplorado. Li ŝatus labori en ekonomio de la lingvo aŭ rilata agado.

Bharato (Hinda Unio)

S-ro Arun Kumar Bhattacharyya loĝas en Kalkato kaj laboras kiel agento pri eksporto. Li serĉas eksterlandajn importantojn esperantistajn. Ĉefe lia fako estas teo produktita en Bharato. Retadreso: arunkb07(a)hotmail.com.

Brazilo

Ĵajro Aŭgusto dos Santos, retadreso jairoad(a)ig.com.br, okupiĝas pri industriaj valvoloj ĝenerale, mekaniko, CNC-maŝinoj (machining centres) kaj industriaj sekurec-valvoloj.

Bulgario

Savova, retadreso grethe(a)abv.bg estas peranto en borso por varoj el Bulgario kaj proponas tritikon.

Ĉinio

Semio, retadreso semio(a)163.com, peras ĉinan kompanion kiu produktas polikristan silicion. Li serĉas landajn perantojn.

Komoroj

La firmao ZAMENHOF ETABLISSEMENT, s-ro MIHIDJAHI ALI MZE, B.P. 8303, KM- MORONI, KOMOROJ (insula grupo nordokcidente de Madagaskaro) deziras komerci diversajn varojn i.a. manĝaĵojn kaj konstrumaterialojn. Tel (+269) 338 81 85, rete ezamenhof(a)yahoo.fr.

Kongo (Kinshasa): Artaĵoj el kupro kaj malakito

Matthieu KASONGO DIEMO, Lumumbashi, ofertas artaĵojn faritajn el kupro kaj malakito. Vidu je http://www.komerco.sup.fr/; http://www.mateokd.sup.fr. SKAJPO: mateokdd; retpoŝte mateokd(a)yahoo.fr, tel. +243 812883600



Rusio

Aleksej Rostov, retadreso www.avtex.spb.ru, eksportas bonkvalitan (sen miksaĵoj) fluoroplaston f4 el Sankt-Peterburgo, Rusio. Nia retejo estas nur en la rusa, bedaŭrinde, tamen ni pretas respondi ĉiujn viajn demandojn.

**Malnovaj numeroj de La Merkato kaj Laŭokaza novaĵletero (iom) alireblas**

La tekstoj de La Merkato ekde 1995 preskaŭ plene legeblas en la retpaĝaro de IKEF. Por la pli malnovaj numeroj (kaj por Laŭokaza Novaĵletero, la antaŭanto de LM) ne disponeblas ciferecaj versioj kaj iliaj skanado kaj enretigo nuntempe estus tro komplikaj. Por igi tiujn numerojn almenaŭ iomete disponeblaj, nun estas enretigita iliaj enhavo. (rr)

**Sanstato de Franz Braun bone evoluas**

Komence de la jaro Franz Braun, fondinto kaj eks-prezidanto de IKEF, grave malsaniĝis. Antaŭ nelonge, nia estrarano d-ro Hornecker sukcesis telefoni kun Franz. Li ricevis la ĝojigan novaĵon ke lia sano bone evoluas. Tamen, restas ankoraŭ gravaj problemoj, ekzemple pri lia memoro. Pro tio ankoraŭ ne eblas rekomenci la kutiman korespondadon. Franz petas transdoni plej korajn salutojn al la gesamideanoj. (rr)

**IKEF-Ĉinio 2008 en Xiamen**

La jarkunveno sukcese okazis de la 11a ĝis la 13a de oktobro 2008 en la ĉemara urbo Xiamen. Partoprenis 41 personoj, inter ili IKEF-delegito Silvio Mates, brazila peranto kaj estrarano de IKEF. La kunveno estas gvidita de s-ro Ĉielismo, ĉina peranto kaj estrarano de IKEF. La partoprenantoj interŝanĝis komercajn informojn kaj diskutis multe pri kunlaboro kaj varoj. Ili subskribis kelkajn kontraktojn kaj protokolojn pri komerco kaj kunlaboro.

La kunveno decidis ke IKEF CHINA 2009 okazos en Shanghai, de la 11a ĝis la 13a de oktobro 2009, antaŭ la Ĉina Foiro Aŭtuna en Kantono.